

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Julio 1948

36-a jaro N-ro 7

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

## Impona Germana Kongreso



La solena malfermo.

**Pli ol 2000 personoj partoprenis la germanan Esperanto-kongreson.**

La plej granda nacia kongreso en la historio de Esperanto okazis dum la pentekosto ĉijare en München. Estis la unua germana Esperantokongreso post la mondmilito. Partoprenis proksimume 2100 personoj. Inter ili ankaŭ sesdeko da eksterlandanoj el 15 nacioj. La ĉefurbestro de München, D:ro Scharnagl, estis la honora prezidanto. Tuj post la kongreso okazis internacia junulkunveno en la mondfama urbeto Garmisch-Partenkirchen. La honora prezidanto de tiu kunveno estis la prezidanto de la bavara parlamento, D:ro Horlacher.

**La kongreso.**

Al la grandioza kongreso anoncis sin pli ol 300 eksterlandanoj, inter tiuj ankaŭ 20 svedoj. Bedaŭrinde la

amerikaj aŭtoritatoj en Germanujo donis permeson al entute ĉirkaŭ nur 60 eksterlandanoj. Tri svedoj havis la bonŝancon veni al Munkeno.

La pentekostan sabaton, posttagmeze, komenciĝis la unua kunveno en granda serio da imponaj aranĝoj, nome la kunveno de la pli vasta estraro de Germana Esperanto-Asocio. Oni traktis kelkajn organizajn aferojn, kaj poste la tuta estraro estis invitata al la urbestro. Je la 19-a, la saman tagon, okazis en la teknika atlernejo propagandkunveno sub la temo: "Eksterlandanoj parolas al germanoj".

Inter aliaj parolis s-ro Bannier de Francujo, s-ro Sayers de Ameriko kaj s-ino Mayer de Anglujo. Multnombra publiko plenigis la ĉambregon, kaj fortaj aplaŭdoj aŭdigis de la dankema publiko.

Protestanta kaj katolika diservoj estis la unuaj aranĝoj dum la pentekosta tago. Pastro Hoppe el Co-burg predikis en la protestanta diservo en la preĝejo "Erlöserkirche".

**La solena malfermo de la kongreso.**

Proksimume 2100 personoj, inter ili nombro da honoraj gastoj, sidis en la grandega halo de la Germana muzeo, kiam venis la granda momento de la oficiala malfermo. Sur la scenejo sidis en longa vico la reprezentantoj de la germana esperantomovado kaj pluraj konataj eksterlandaj esperantistoj. D-ro Ziegler, la ŝatata prezidanto, malfermis oficiale la kongreson. Kiel duan parolanton ni aŭdis la ĉefurbestron de München, d-ro Scharnagl, kiu montriĝis esti granda amiko al esperanto. Por la registaro de la bavara parlamento parolis la kulturministro, d-ro Hundhammer, kiu finis sian interesan paroladon citante en Esperanto la lastajn frazojn de la himno. En la nomo de la bavara parlamento parolis en esperanto la parlamentano redaktoro Lorentz. Universitata profesoro Strecker parolis en la nomo de Universitato Giessen. Poste sekvis multaj paroladoj de reprezentantoj de la fervoja direkcio de la bavaraj sindikatoj kaj de kelkaj politikaj partioj. La eksterlandanoj poste parolis en la nomo de siaj landaj organizoj. La nederlanda reprezentanto transdonis flagon esperantan. Finfine okazis paroladoj de la diversaj sekciestroj. La solena malfermo finiĝis per "La Espero", kiu forte kaj entuziasme sonis. Post la solena malfermo okazis gazetarkonferenco en Park-Hotelo, kie ĉeestis pr. 30 jurnalistoj kaj reprezentanto de la radiostacio.

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Julio

1948

## Citado

Ni de tempo al tempo havas la ĝojon vidi, ke aliaj esperantaj gazetoj represas partojn de nia enhavo. Tiel ni ankaŭ mem faras.

La manon sur la koro, estimataj esperanto-gazeto-redaktoro-kolegoj, ĉu ni ne ĉiuj pli-malpli multe redaktas niajn organojn per kompilado de artikoloj, kiujn ni legas en aliaj gazetoj? Ja ofte estas la sola maniero, per kiu ni ekhavas informon pri esperanta okazintaĵo.

Tiom longe, kiom ni ankoraŭ ne posedas esperantan "telegramoficejon", ni certe devas trovi la plejparton de niaj novaĵoj en la ceteraj esperantaj gazetoj.

Sed en nia citado ni laŭeble aplikas certajn principojn. Se ni pli aŭ malpli laŭvorte citas alian esperantogazeton, ni inter krampoj donas la nomon de la citita gazeto, ev. per klara mallongigo. Se ni grave mallongigas aŭ aliformigas la materialon, kiun ni prenas el alia gazeto, ni indikas la fonton per dono de la nomo de la gazeto, sed metas antaŭ la nomon la vorton "laŭ". Nur en tiaj kazoj, kiam la citita gazeto evidente ne estas la fonto de la novaĵo, ni preterlasas la mencion de la nomo.

Ni ne volonte aŭdacas proponi, ke niaj kolegoj sekvu proksimume samajn principojn. Sed ni ĝojas, kiam ni vidas, ke oni respektas tiun regulon.

Oso.

Kelkaj eksterlandanoj cetere ankaŭ estis videblaj ĉe la konferenco. Post la komuna tagmanĝo okazis la ĉefa kunveno de la GEA en la aŭlo de la Universitato. D-ro Ziegler malfermis la kunvenon antaŭ pli ol mil personoj kaj donis agadraporton. Oni elektis la novan estraron kun d-ro Ziegler kiel 1-a prezidanto. Göttingen invitis al la kongreso en 1949.

La Pentekostan lundon okazis fakkunveno en la Germana muzeo. Multaj paroladoj estis en la tagordo, ekz. pri Esperanto kaj fervojo, Esperanto kaj gazetaro, Esperanto kaj radio ktp. Kiel lastan punkton d-ro Ziegler laŭtlegis rezolucion koncerne esperanton en la lernejoj germanaj. Posttagmeze okazis diversaj bone vizitataj fakkunsidoj, inter aliaj kunvenis la junulara sekcio. La juna entuziasma publiko partoprenis kun granda intereso la kunvenon. Oni reelektis la estraron. S-ro Horst Kliemann de Hannover estas prezidanto.

La tuta kongreso iom post iom atingis la finon, kaj la partoprenintoj povis konstati plenan sukceson, kvankam la kongreso okazis en lando, kie oni eĉ ne havas manĝaron por la tago aŭ vestojn. Sed, dank' al grandega organiza laboro de la membroj de la Esperanto-klubo "Laboro" en München, ĉio bone funkciis. La manĝaro en la "Grandkuirejo" estis eksterordinare bona laŭ germanaj cirkonstancoj. Ĉiuj bone loĝis dum la München restado. Speciale notinda estis la aranĝoj ĉe la centra stacidomo de München, kie oni havis grandajn ŝildojn "Esperantistoj bonvenaj al Munkeno". Kaj ekster la stacidomo oni havis specialan barakon, kie estis la akceptejo kun multaj deĵorantoj, kiuj afable helpis al ĉiuj. La kongreso havis specialan stampilon poŝtan.

Jes, multon oni povus rakonti pri tiu belaga okazintaĵo, sed la spaco ne sufiĉas.

La urbo München estas ĝis 30 % detruita, kaj estis fakte malĝojige por eksterlandano de bonstata lando ĉirkaŭvagi inter la ruinoj. Sed la homoj havas ankoraŭ la esperon pri pli bonaj tempoj, pri pli bonaj kondiĉoj.

Karl Erik Karlsson

## Esperanta instruo en nederlandaj lernejoj

La nederlanda parlamento diskutis la enkondukon de esperanto kiel nedeviga fako. Kelkaj parlamentanoj varme pledis por la afero. Malgraŭ tio la instrua ministro ne kuragiis leĝe ordoni pri la afero. Li tamen volas subteni sincerajn petojn pri enkonduko de certajn klasojn, en kiuj la instruistoj aŭ aŭtoritatoj deziras esperantoinstruadon.

## Poloj kontaktas balkanlandojn

La Asocio de esperantistoj en Pollando sciigis al la Balkanlanda Kontakta Komitato, ke ankaŭ ĝi aliĝas. Kiel oficialan redaktoron de la pola parto por "Internacia Kulturo" oni nomas s-anon Isaj Dratwer.

La Asocio jam entreprenis ĉiujn necesajn paŝojn por aliĝi al UEA. Krom tio ĝi komencis klopodi ĉe la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, petante permeson por kelkaj delegitoj, kiuj partoprenos la Unuan Konferencon de Danublandaj esperantistoj en Budapeŝto kaj ankaŭ la Universalan Kongreson en Malmö. (Laŭ Intern. Kulturo).

## Bulgara koopera presejo esperantista

La fondita en 1947 Esperantista Kooperativo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio celas eldoni kaj disvastigi esperantoliteraturon kaj apogi materiale la movadon en Bulgario. La kooperativo sukcesis aĉeti propran presejon. Ĝi disponas pri pres- kaj aliaj maŝinoj kaj pri centoj da kilogramoj da bulgara kaj esperanta literaroj. Tie jam aperis la 1-2 numeroj de "Internacia Kulturo". Sub preso estas nova lernolibro.

## La fremda kadavro for!

En sia numero 12.1 la Varsovia ĵurnalo "Wieczor" (Vespero) enhavas artikolon "Sensacia pledo de esperantistoj por forigo de la kadavro de d-ro Wolff el la tombo de d-ro Zamenhof", pri afero, kiu certe interesos la esperantistaron ankaŭ ekster la limoj de Pollando. Dum la "insurekcio" de 1944 (poloj ne ŝatas ĉikoncerne la vorton "ribelo") estis enterigita en la Zamenhofa tombo la kadavro de iu d-ro Wolff. Pro rifuzo de la Juda Kongregacio, translokigi tiun kadavron, Pollanda Esperanto-Asocio decidis procesi, pere de samideano advokato R. Sakowicz, kontraŭ la Kongregacio, por atingi, ke la fremda kadavro estu forigata el la tombo de d-ro Zamenhof. Nun la kontraŭuloj petis tempon por pace aranĝi la aferon. La esperantistoj konsentis, kaj la proceso provizore estas prokrastita. (Esperantobladet).

## Esperantista vilaĝo sur Sardinio

Se oni povus efektiviĝi la projekton pri esperantista vilaĝo sur Sardinio, ni ekhavus ion unikan. Oni aĉetis 80.000 kvm da tero sur la bordo de la nomita insulo. Oni dividis tiun teron en partoj po 1000 kvm kaj forvendos tiujn partojn al interesatoj. La prezo estas 50 usonaj dolaroj por ĉiu.

En ĉiu parto la aĉetinto povos konstrui vilaon aŭ dometon laŭ sia plaĉo kaj monujo. Ankaŭ estos kelkaj komunaj aranĝoj, kiel banejo ktp kaj malgranda hotelo. En la vilaĝo, por kiu oni proponis la nomon Zamenhofas, oni parolos nur esperanton.

La projekto estas tiel bela, ke oni devas ĝoji, se ĝi efektiviĝos. Ĉu estos eble, estas alia afero. Interesiĝantoj sin turnu al s-ro Arturo Martellotta, ĉe Genio Civile, S a s s a r i, Sardinio, Italujo. Ni esperas, ke li povos respondi. Kaj kompreneble neniu skribonto forgesos aldoni unu aŭ plurajn respondokuponojn!

## Publikigita rezolucio

Ĉe la jarkunveno de la danaj esperantistoj oni kiel en Svedujo akceptis rezolucion pri la esperanta movado kaj ties utiligado flanke de multaj praktikaj entreprenoj. Tiun rezolucion publikigis Pressens Radioavis kaj multaj danaj taggazetoj.



BONVENON

al

MALMÖ

## Franca kaj pola prezidantoj esperantemaj

La petskribon al UNO pri la enkonduko de esperanto subskribis la franca kaj la pola ŝtataj prezidantoj. La esperantistoj ja ne estas tro dorlotitaj per la favoro de ŝtatestroj. Do tio estas por ni bona signo pri la progreso de la ideo mondlingva. La sveda pacorganizito "Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen" donis subskribon por siaj ĉ. 12.000 membroj. La tuta nombro da subskriboj estas 4.144.000.

## Urugvajaj instruistoj pledas por esperanto

La federacio de urugvajaj instruistoj decidis fari rezolucion al UNO, ke esperanto estu akceptata kiel internacia lingvo. Gis tiu deziro efektiviĝis oni postulas, ke la hispana lingvo estu samrajta kun la ceteraj traktadlingvoj de UNO.

## Publika danko al la sveda geesperantistaro

Estante prezidanto de la helpkomitato en Kattenvenne mi turnis min al ĉiuj esperantogrupoj kaj UEA-delegitoj en Svedujo, petante ilin, ke ili bonvolu helpi al infanoj (rondcifere 90) de fuĝintoj el la orientaj regionoj de Germanujo kaj de ekziligitoj, kiuj devis perforte forlasi la hejman regionon, en kiu la gepaŭloj jam vivis de jarcentoj. Oni permesis al ili kunpreni nur malmultegan havaĵon. Baldaŭ estos foruzita la malgranda vestaĵa kaj tolaĵa restaĵo. Nenio estas acetebbla normalpreze.

La mizero nur iom post iom diskonigas tra la mondo. La nutrado estas nesufiĉa; la sekvoj estas malsaneco pro manko de albumeno kaj grasajo, la tuberkulozo disvastigas terure.

Ni petis akcepti "patronadon" por la infanoj kaj subtenon per regulaj nutraĵsendaĵoj, uzitaj vestaĵoj, ŝuoj kaj tolaĵoj. Ciu patrono senpere terrilatas kun la familio de infano. Ciu donacinto scias, al kiu li ion sendas, kaj li ekscias, kio mankas al la infanoj.

Sukceso: Gis nun ricevis 49 % de la infanoj sendaĵojn. Krom tio ekestis korega leterinterŝanĝo kun svedaj gesamideanoj, pri kio mi ege ĝojas.

Ni ekziligitoj vivas en mondo plena de malamo, kaj tio estas por ni preskaŭ miraklo el la fabelujo, ke fremduloj sendas al ni pakajon kun multvalora enhavo!

En la nomo de la ekziligataj patrinoj kaj ankaŭ en la propra nomo mi esprimas mian elkoran dankegon al ĉiuj samideanoj, kiuj helpis mildigi la mizeron per bonfaro.

Sed duono el la infanoj estas ankoraŭ sen subteno. Mi elkore petas ĉiujn tiujn, kiuj emas helpi kaj kiuj estas pretaj transpreni "patronadon", ke ili bonvolu sendi al mi la adresojn.

Elkoran dankegon al ĉiuj, kiuj anoncas sin. — Josef Simon, (21a) K a t t e n v e n n e nr. 33, Westfalio, Brita zono, Germanujo.

## Esperanta hundo savas vivon

Antaŭ iom da tempo dujara kabineto staris sur la rando de trotuaro ĉe strat-angulo kun ega trafiko en Stockholm, fronte en la straton, kiam aŭto venis plenarype, turnonte ĉirkaŭ la angulo.

La hundo Sniffe komprenis la situacion kaj donis al la etulineto puŝeton kontraŭ la ventro, sidigante ŝin tiel sur la rando de la trotuaro. La etulino ekploris pro timo, sed en la sama momento la gepatroj, interparolantaj kun konatulo, rimarkis ŝin kaj la danĝeron, en kiu ŝi estis.

La hundo Sniffe kiel premion por sia bona agado ricevis de sia mastrino du varmajn kolbasojn, kiajn oni vendas en la strato. La hundo apartenas al nia samideanino Siri Linnander, kaj ĝi tre bone komprenas esperanton. Cetere ĝi estas tre nobla hundo, kiu ricevis premion en Kennel-ekspozicio.

Nova skolta gazeto.

"La Skolta Mondo" ekaperis. Ĝi estas anstataŭanto de la pli frua La Skolta Bulteno. Ĝi estas organo por Skolta Esperantista Ligo.

## Malmö ĉiutage radiosendos

Ni ĵus ricevis informon, ke dum la kongresa semajno 31/7-7/8 Malmö inter la 16.00-16.15 h. MET per mallongaj ondoj 19,80 m kaj 27,83 m sendos informojn pri la kongreso.

La nombro de sinanoncintoj por la kongreso nun estas 1400 el 31 landoj.

## Per speciala aviadilo al Malmö!

Se en Belgujo sin anoncas 27 interesatoj por aviadila vojaĝo al la Universala Kongreso, la prezo iĝus 1800 bfr (triaklasa fervojbileto kostas 1524 bfr) por la aerreturo Brusel-Malmö-Brusel en speciala aviadilo. Partoprenontoj povos ekveturi laŭ elekto de la flughavenoj en Brusel aŭ Gent. Ili rajtas kunpreni 50 kg da pakajo. (Flandra Esperantisto).

## - MĀNADENS BOKTIPS -

Jam internacie fama detektivo de fikcio

**DETEKTIV-INSPEKTORO FRENCH**

de Scotland Yard

faras sian debuton al la Esperanta publiko en

la nova verko de

*Freeman Wills Crofts*

# MORTO DE TRAJNO

Tradukita de Mason Stuttard

Kiu iĝis La Trajnon morti? Kial La Trajno mortis? Kiel La Trajno mortis? La respondoj troviĝas en ĉi tiu intereskapta mistero de la fervojo.

256 paĝoj. Bindita sv. kr. 7:—.

Eldonita de

**THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY  
LTD., ANGLUJO**

Mendu ĉe

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

## Nia libertempa komenciĝo

Mi fermis la grandan valizon, sed mi tute ne povis fiksi la bukojn. Miaj muskoloj elstaris kiel tiuj de forĝisto kaj la ŝvito malsekigis al mi la frunton. Ne, mi ne povis. La valizo estis tro, tro plena.

De la enhavo 75 % apartenis al mia edzino kaj la resto al mi. Estis ŝia ideo, ke ni kunportu nur unu valizon, ŝi rezonis, ke se ni kunportus du valizojn kaj perdis ilin, estus pli malfacile rehavigi ilin ol se ni kunportis unu kaj..... ktp.

"Venu kaj sidigu sur ĉi tion, Eva", mi spiregis.

"Ĝi enkavetiĝos se mi sidos sur ĝi."

"Ne restas iu spaco por enkavetiĝo. Sidigu, Eva."

Ŝi obeis, kaj fine mi fiksis la bukojn.

"Johano, mi pensas, ke mi devus kunporti mian pluvmantelon. Eble pluvos."

"Via pluvmantelo estas en la valizo. Kaj ne pluvos. Ne estu tiel pesimista!"

"Mi devas insisti," rediris Eva, "ĉar certe pluvos."

"Kara, eble ĝi kuŝas funde de la valizo."

"Ne, ĝi estas supre de la vestaĵoj. Mi scias. Mi bedaŭras, Johano, sed —"

Mi malfiksis la bukojn per ambaŭ manoj. La kovrilo tuj suprensaltis kiel risorto.

"Prizorgu, Johano! Ne estu tiel perfortema!"

Senvorte mi elteris la pluvmantelon kaj pasigis ĝin

al ŝi. "Ĉu vi deziras ion plu, antaŭ ol mi refermos la valizon — se eble?"

"Ne-e-e." Ŝi pensadis. "Mi kredas ke ne." Ŝi denove sidigis sur la valizon kaj mi penegis refermis ĝin.

"Ĉu vi havas la biletojn, Johano?"

"En mia poŝo, mia kara," mi respondis triumfe. Mi elteris mian monujon kaj montris la biletojn. "Jes, ĉio estas ĉi tie, kaj la —"

"Johano!"

Mi staris tie, la monujo en la mano.

"Johano, mi tre bedaŭras, sed mi lasis la adreson de S-ino Carson en la valizo."

"Eva! Vi skribis al ŝi tri foje por aranĝi nian restadon kaj vi ne povas memori ŝian adreson?"

Mi metis mian monujon sur la tablon, ne dirante eĉ unu vorton. Mi iris rekte al tirkesto kaj elteris pantanĉilon. Vidante ĉi tion, Eva ekkriegis:

"Kion vi faras?"

"Estante kompatemulo," mi respondis, provante spiri trankvile, "mi ne faros tion, kion vi ŝajne atendas. Mi intencas nur eltranĉi grandan truon en unu flanko de la valizo, por ke vi povu emeti la manon kaj elteri ion ajn, kion vi bezonas."

"Ne ŝercu! Mi tre bedaŭras, sed mi devas eligi tiun adreson. For! Mi mem malfermos la valizon."

Ŝi kliniĝis kaj tiris je la bukoj. La kovrilo tuj suprensaltis kiel risorto kaj ŝi ekkriegis. "Ho, mia fingro!" Ŝi metis ĝin en la buŝon kaj suĉis ĝin. Mi tute ne povis ne rideti. Ŝi malbonhumore serĉis en la valizo kaj fine trovis tion, kion ŝi bezonis. Ŝi remetis la supran vesttavolon.

Mi denove kliniĝis kaj provis refiksi la bukojn dum Eva sidis sur la valizo. Tamen, ĉu mi sukcesis? Tute ne! Ŝajnis, ke ju pli ni elprenis, des pli la valizo pli-grandigis. "Vi ne estas sufiĉe peza", mi diris. "Mi faru tion." Eva starigis. Mi tiris la valizon al la planko kaj genuiĝis sur ĝi. Post penega luktado kun la bukoj, mi fine venkis.

La pordsonorilo eksonoris. La taksfiakrulo, sendube. Mi ekiris antaŭen, forgesinte la valizon, kuŝanta sur la planko.....

Per la helpo de Eva mi penegis resurpiedigis.

"Ho, mi povus esti rompinta la kolon pro tiu — tiu —"

"Vi ne ĝenis vin kiam mi vundis al mi la fingron," respondis Eva, vidante ke mi ankoraŭ vivas.

"Nu, vi havas dek fingrojn sed mi havas nur unu kolon," mi rediris, lamante al la eksterpordo.

La taksfiakrulo estis tie. Mi elportis la valizon dum Eva faris lastan ĉirkaŭrigardon en la domo.

"Kia bonega vetero!" mi ekkriis ĝoje dum ŝi ŝlosis la dorpordon. "Ne estas eĉ unu nuboj en la ĉielo!"

"Kio estas tio?" Eva demandis. Ŝi havas mirindan vidpovon. Ŝi montris sur nubeton apud la horizonto; nubeton kiu, kiel tiu en la Biblio, ne estis pligranda ol mano de viro.

Survoje al la stacidomo, ni devis atendi, verŝajne, meze de ĉiu trafikmiksamaso en la urbo. "Ni ne trafos, nian trajnon," mi diris, rigardante mian poŝhorloĝon. Feliĉa rideto estis sur la vizaĝo de mia edzino, sed mi estis nun tro nerva ŝati ĉi tiun modernan **Mona-Lisa'n**.

"Vi havas la biletojn, Johano?" ŝi demandis.

"La biletojn? Jes, jen —" mi frapetis la poŝlokono — "jen — mi esperas, ke —" Mi metis la manon en la internan poŝon. "Hej! hej! Kie estas —?"

Kiel frenezulo mi serĉis ĉiujn miajn poŝojn. Ni nun alproksimiĝis al la stacidomo.

"Eva! Mi postlasis la biletojn! Hej, diru al la — Hej, vi, haltu! haltu! HA —"

"Jen viaj biletoj, Johano!" diris Eva, ridetante, kaj montris al mi la nun-mirindajn paperaĵojn. Mi estis tiel feliĉa ke mi kisis ŝin. Mi kisis ŝin tiel fervore, ke ŝi rigardis min kun plezuro kaj suspekto intermiksita.

**J. Bruno**

### Germana junularo eldonas gazeton.

Ni ne estas certaj, sed konjektas, ke oni planas eldoni ĝin monate. La unua numero grandparte estas en esperanto.

La artikolo de Nylén aperis en Jämtlands Tidning.

### Allt flera har insett

att esperantorörelsen behöver  
det stöd klubbar och enskilda  
esperantister kan ge genom att

### Teckna andelar i

## Förlagsföreningen Esperanto upa

Den inbjudan till andelsteckning som vi i föregående nummer riktade till Sveriges esperantister har till vår glädje vunnit allmänt gehör. Till den lista över nyteckningar som då publicerades kan vi idag foga ytterligare ett stort antal.

### Redovisning:

Nytecknade andelar:

Transport från föregående redovisning	1.000:—
Birger Gerdman, Stockholm 1 andel	50:—
Lennart Aberg, Skövde 1	50:—
Sven Ragnar, Norrköping 1	50:—
Asta Håkansson, Stureby 2	100:—
Martin Eriksson, Stockholm 1	50:—
Josef Pihlström, Kolmården 1	50:—
Gösta Norling, Uppsala 1	50:—
T. Nordlöf, Torrom 1	100:—
Tiberio Morariu, Stockholm 1	50:—
Fritz Lindén, Töreboda 1	50:—
Krylbo Esperantoklubb 1	50:—
Sven Sjöblom, Malmö 2	100:—
Sven Alexandersson, Sthlm 1	50:—
	1.800:—
+ andelskapital pr den 1.1. 1948	16.300:—
	<b>Totalt kronor 18.100:—</b>

Andelsteckningen fortsätter, och det är vår förhoppning, att klubbstyrelserna tar upp frågan på nästkommande sammanträde och beslutar om inköp av ett antal andelsbevis. De enskilda esperantisterna har föregått med gott exempel och väntar vi även i fortsättningen att deras förståelse för nödvändigheten av ett starkt esperantoförslag skall mana till efterföljd.

Andelsbevis à 50 kr. kan beställas genom att insända likvid till vårt postgirokonto 578, varvid beställningen skrives på talongen. Inbetalning kan även ske i mindre poster med slutbetalning senast den 31.12 1948.

Styrelsen för Förlagsföreningen Esperanto upa

## Konkurso pri sporta verkaĵo

La oficiala organo de la brita olimpa komitato, World Sport, aranĝis konkurson, kies objekto estas verko de artikolo pri temo: "Kiel internacia interkompreno kaj amikeco estas akcelataj per la sporto". La verkintoj de la plej bonaj kontribuoj estos premiataj per senpaga restado en Londono dum la olimpiado, estante de la 28-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto la gastoj de World Sport. Apartaj lokoj estos rezervitaj por ili en Wembley kaj ili estos ĉiel prizorgataj dum la restado.

Ni eksciis, ke sveda sporta pedagogo en la kadro de tiu konkurso faris projekton pri sportaj konkursoj inter la junuloj de la tuta mondo, okazantaj dum aparta "Tutmonda sporta tago", kaj donis detalan planon pri la aranĝo de tiaj konkursoj.

Se oni deziras kapti grandiozajn arojn da partoprenantoj devas esti plenumataj la jenaj kondiĉoj:

la konkursoj okazu en la hejmloko,

koncernu limigitan nombron da simplaj sportaj branĉoj,

ebligu kiel eble plej justan taksadon de la rezultatoj. Por tia taksado la proponito ellaboris tabelon.

La "Tutmonda sporta tago" devas laŭ la propono esti aranĝata de UN. La venkintoj ricevu diplomon en esperanto, subskribitan de la registroj de la landoj reprezentataj en la konkursoj.

La verkinto montras en sia propono, ke la realigo de tiaj internaciaj konkursoj postulas forigon de unu obstaklo: la lingva diverseco. Tiun obstaklon superas nur unu alia faktoro: la manko de volo de la homoj uzi la lingvon de alia nacio en internacia kunlaboro.

Sed tiu obstaklo malaperos en tiu momento, kiam akceptos la projektita "sporta komitato", laboranta sub la egido de UN, esperanton kiel oficialan lingvon por internaciaj sportaj interrilatoj. Ne nur teorie, sed ankaŭ praktike la internacia esperantomovado montriĝis la plej efika porpaca organizo de la mondo. Se la internacia sportmovado povos efike uzi la servojn de la mondlingva movado, oni gajnos multe pli grandan profiton por la tutmonda paco ol sukcesis atingi ĝisnunaj packongresoj. Nur la sporta movado tiam montros sin potenca faktoro por la akcelo de internacia interkompreno kaj amikeco inter la junuloj de ĉiuj landoj, al kiuj paco sur la tero devas esti la plej valora akirindaĵo de la vivo.

Por plua informo vin turnu al gimnastika direktoro s-ro Einar Blomberg, Sveagatan 22, Göteborg, Svedujo.

## Je la memoro de Emil Falk



La 6-an de junio esperantistoj de Skövde kolektiĝis ĉe la tombo de Emil Falk, pioniro de nia movado en Skövde kaj distrikto Skaraborg. Nia mortinta samideano fervore laboris sub la signo de la verda stelo. Pri tio atestas la bela memorŝtono sur lia tombo, kiu portas la verdan stelon kaj surskribon: LABORO — RIPOZO — PACO.

Ĉe la inaŭgura soleno parolis en la nomo de SEF s-ro Lennart Åberg, Skövde. Li inter alie esprimis dankojn al la parencoj de Emil Falk pro bonvola subteno al la esperantistoj ĉe la starigo de la memorŝtono. Parolis ankaŭ s-ro E. Rendahl, menciante la agadon de nia mortinta pioniro. La solena kunestado finiĝis en la hejmo de la kluba prezidanto, s-ro S. A. Jacobson.

Por prizorgi kaj ornami la tombon de Emil Falk la klubo elektis komitaton. Jam en 1943 okaze de sia 60-jara jubileo Emil Falk je la favoro de la junularo starigis studfondon, kiu portas la nomon: La studfondo de Emil Falk — Esperanto al la junularo. La celo de la fondaĵo estas ekonomie subteni gejunulojn, kiuj deziras lerni nian lingvon.

R-to.

Nur du ĉeloj venos.

Laŭ informo en Esperantista, nur du ĉeloj havos de la aŭtoritatuloj permeson viziti la mondkongreson en Malmö.

## Tri anglaj karavanoj al la kongreso

Tuj kiam la angla registaro nuligis sian malpermeson pri mono por vojaĝoj al Svedujo, la anglaj esperantistoj decidis aranĝi ne malpli ol tri karavanojn al la kongreso en Malmö.

Laŭ nia kompreno, la esperantistoj en ĉiuj landoj devus havi la taskon paroli kaj baloti por la malfermigo de la limoj, por ke ni povu denove libere vojaĝi, aĉeti librojn kaj aboni gazetojn.

## Postmilita Kanto

Formetu la glavon,  
manpremu la fraton,  
Revenu el kampoj de sango!  
Jam venis la horo  
De paca laboro  
Kun nova spirit' en la lando.

Se venus tirano  
Perforta je mano,  
Ni ne lin tolerus senvorite;  
Ne restus ni sklavo;  
Neniam! Per glavoj  
Ni ree batalus ĝismorte!

J. BRUNO.

## LA INTERLIGILO

46 rue Lamartine  
Paris IX, Francio  
plene eldonita  
en Esperanto  
de 1922 j  
interesa  
sperta



revuo  
tutmonda  
Interligeco  
Poŝto, Filatelio  
Telekomunikado  
Fervojoj k. Trafiko  
Aviado, Ŝoseoj, Maro

TUJ PETU SPECIMENON



**Korespondu**

S-ro Omik Sogomonjun, Dr Nider 5, Burgas, Bulgarien. Kor. kun filatelistoj en esp., itala kaj germana.

24-jara instruisto, deziras informojn pri Svedujo: S-ro Singo Okano, 894, 5-ème inecuke-ĉo, Kita-ku, Tokio, (Japan).

18-jara studento: S-ro Katumasa Maeda, Komatubara-dori-6, Wakayama-si, (Japan).

25-jara ĵurnalisto: S-ro Masaru Hamada, 61 Ikenokata, Ŝičikenĉo, Taito-ku, Tokio, (Japan).

Deziras korespondi:

**Ungern.**

F-ino Oroszy Ibolya, V. Nádor ucca 4. Budapest. (ung kv banktjm.)

**Tjeĉkoslovakien.**

S-ro Josef Janušek, Zilina, Doluy val 24 (23-ĉrig tĵansteman).

Stěpán Matějka, Belá peá Bezdězem 20, Bómen, (rektor).

Ján Volánsky, Nám. m. Rázusa 14, Bardejoo (14-ĉrs student).

17-jara liceano-skolto deziras korespondi kun samaĝa svedino: S-ro Miloš Droppa, Hviezdosl. 234, Lipt. Hradok, Ĉeĥoslovakio.

**Tyskland.**

Herbert Schwedler, (15b) Kótschau nr 17, Post Grossschwabhausen Ŭber Jena/Thüringen, Ryska zonen.

Herbert Pierchalla, (24b) Meldorff/Holstein, Klosterstr. 53, Br. zon.

Wolfgang Beutin, Meyerstr. 24, Bremen, USA-zon, (14-ĉrig stud.)

F-ino Hilde Wornebier, Hellweg 68, Dortmund—Kórne, Westf.

Reinhold Beckman, Grüne—Linde 2, Bremen—Seb. (14-ĉrig stud.)

Otto Suhling, Hamburger Str. 246, Bremen, USO-zon, (20-ĉrig stud.)

F-ino Elisabeth Pfeifer 13a, Busteliistr. 12, Aschaffenburg/Main, USA-zon, (handelslárarinna).

F-ino Gisela Schmidt, Liboristr. 31, Dortmund/Kórne, (13-ĉrig stud.)

Horst Patke, 206 Elvershausen 46, Kreis Northheim, Br. zon.

Mi serĉas kontakton kun svedo, kiu emas sendi svedajn poeziaĵojn por ĉeĥoslovaka literatura revuo. Skribu al s-ro Pavol Števat, Dvorniky, distrikto Krupina, Ĉeĥoslovakujo.

**Redakcia leterkesto**

Nun ni estas laborintaj ĉiun tagon dum 12 horoj dum tuta semajno per ĉiuj poŝtaĵoj (kara kompostisto, nun ne kompostu poŝtaĵoj, ĉar civile ni estas instruisto!), kiuj kolektiĝis amase dum tiu tempo en la printempo, kiam ni absolute ne havis tempon respondi leterojn aŭ cetere entrepreni ian esperantaĵon.

Jen do denove ĉiuj manuskriptoj por la gazeto. Ĉiu devus esti en la gazeto. Versajne kelkaj ne trovos lokon. Kaj tamen restas tiu bona kaj streĉa rakonto pri la fantoma sonĝo. Kaj la interesa scienca artikolo pri kuracado. Kaj multaj, multaj aliaj. Kiam ni trovu lokon por ili? Kaj kiam ni trovu tempon reskribi maŝine tiun bonan amuzan rakonton, kiun ni devis atendigi dum monatoj? Hu, terure! Kiel sin sentas ĉiuj aŭtoroj, kiuj ne vidas siajn manuskriptojn utiligataj? Sed, fakte ni ne povas helpi.

**RADIO.***Tempo MET.***ĈIUTAGE:**

17.30—17.45 Praha 31,41 m kaj 1935 m. Bulteno kaj muziko.

18.15—18.30 Paris 41,21 m. F-ino Huguette Royer kaj s-ro Delaire. Radiodiffusion Française, Emissions espérantistes, 118 Champs Elysées, Paris 8.

23.00—23.15 Praha 49,92 m. Komentario kaj informa bulteno.

Dum la tempo 31/7—7/8 je 16.00—16.15 h la sveda radio ĉiutage sendos informojn pri la Universala Kongreso en Malmö per la ondoj 19,80 m kaj 27,83 m.

**DIMANĈO:**

06.00, 07.00, 10.00 12.00 Radio-Esperanto (nigra stacio) 5 m.

**LUNDE:**

18.30—18.40 Wien 31 m 41 m 229 m. Esperantlingvaj informoj.

22.50—23.00 Praha I 470 m. Tre varia programo.

23.30—23.35 Budapest I 550 m. Informoj. — Hungara

Radio, VIII. Bródy Sándor u. 7, Budapest, Hungarujo.

**MARDE:**

19.05—19.10 Bern 25,61 m kaj 48,66 m. Prelegas A. Baur pri svisaj aferoj.

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Informoj el Bulgarujo. — Radio Sofia, Esperantosekcio, Sofia, Bulgarujo.

22.50—23.00 Ostrava 259 m. Aktualajoj en Ĉeĥoslovakio. Leterkesto. — Esperantoservo de la Radiostacio, Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

**MERKREDE:**

21.10—21.25 Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. — Esperantosekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa, Polujo.

23.30—23.35 Budapest I 550 m. Vidu sub Lunde.

**ĴAŬDE:**

17.50—17.55 Wien II 31 m, 41 m kaj 228 m. Informservo.

19.05—19.10 Bern 25,61 m kaj 48,66 m. Federalismo kaj paco, paroladetoj de d-ro Edmond Privat.

20.45—21.00 Hradec Králové 238 m.

22.50—23.00 Praha I 470 m. Vidu sub Lunde.

23.00—23.10 Ostrava 259 m. Vidu sub Marde.

**VENDREDE:**

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Prelegoj pri socio, kultura, ekonomia, politika vivo de Bulgario.

22.50—23.00 Ostrava 259 m. Vidu sub Marde.

23.30—23.35 Budapest I 550 m. Vidu sub Lunde.

**SPORADE:**

2.8. je 23.00—23.30 Praha 269 m kaj 325 m. Artprogramo en esperanto.

6.9. je 23.00—23.30 Praha 269 m kaj 325 m. Artprogramo en esperanto.

Ni legis iom de Svenska Turistföreningen. Ĉu vi scias, kial ĝi havas pli ol 200.000 membrojn? Ĉu pro siaj belaj okuloj? Ĉu pro la migradohejmaj? Ĉu pro la per ŝtonoj montritaj vojoj en la montaro? Nu, ni supozis, ke la ĉefa kaŭzo estas la bela jarlibro. Kaj la konkludoj por Svenska Esperanto-Tidningen?

Jam la somero plene floras. Do, por la redaktoro estas tempo pensi pri la kristnaska numero de la gazeto. Kiu havas bonajn artikolojn kaj bonajn ideojn pri ilustrado, skribu al ni. Prefere tuj.

Kelkajn artikolojn kun bildoj pri sveda vivo kaj fano ni bonvenigus. Kiam ni estos riĉa, ni pagos honoraron. Estus beleta heredaĵo por viaj pranepoj.

**Red.**

## Anoncetoj

### La naturbela arkipelago

de Stockholm invitas vin por kelkaj liberaj tagoj inter liberaj homoj. Senprokraste skribu al ni pro detaloj: Norda Sunsporto, Götgatan 124, Stockholm.

### Ĉu vi iros al Malmö?

Se jes, iru unu aŭ du semajnojn antaŭe por ĉeesti la internaciajn feriajn kursojn en Helsingør, Danlando, 17—24 kaj 24—31 de julio. Tie vi ekhavos parolan ekzercon antaŭ la kongresa praktikado. Petu prospekton ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

### Karaj Svedjunuloj!

Kiu povas por mi malhavi la 1, 4 kaj 50-an numerojn de "Karl-Alfred" el jaro 1946? En presejo Hälsingborg jam elĉerpiĝis. Mi servoprete laŭ deziroj rekomencos. Robert Farkas, Pécs, Kiss Ernő u. 23, Hungarujo.

### Skandinavan junul(in)on,

flue parolantan esperante gastigos senpage samideanaro de Pontoise apud Parizo dum du septembraj semajnoj. Skribu al Tribouillard, 4 Avenue Jules César, Saint-Ouen-l'Aumône, (S. et O.), Francujo. (Dansk Esperantoblad).

### Helpu la germanajn esperantistojn!

Por helpi al la germanaj esperantistoj, al kiuj mankas ĉio, mi volas starigi aron de amikaj kluboj. Bv skribi al mi por pluaj informoj! S-ro Georg Lisbjerg, Udsigten 23, Kolding, Danujo.

### Esperantoservo Bremen

petas kontakton. Ni pro manko de loko ne povas publikigi la alvokon, sed petas la samideanojn skribi al Esperantoservo Bremen, Kornstrasse 156, (23) Bremen, Germanujo, USA-Zono. Red.

### Junularkunveno

okazos 15—31 de julio en Versailles, Informoj kontraŭ rpk ĉe s-ro L. Chillard, 5, Avenue de Saint-Cloud, Versailles, (Seine-et-Oise), Francujo.

### Esperantoseminarion

aranĝas la franca asocio de esp. geinstruistoj 9—31 de aŭg. 48. Informojn kontraŭ rpk de s-ro H. Michard, Epineur — le Seguin, (par Laval — annesce) (Mayenne), Francujo.

### Tutmonda Junular-Organizo dekjara.

TJO festas sian dekjaran ekziston kaj pro tio eldonis broŝuron pri la ekesto, historio kaj nuna stato de la organizo. La broŝuro estas havebla por 40 oeroj de s-ro Karl-Erik Karlsson, Upplandsgatan 69, 1 tr., Stockholm. Gironumero 25 26 74.

## Svenska Esperanto-Tidningen

### La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V. Tel. 29 03 81.

Prenumerationspris. Helt år (12 nr) kr. 4:—, Lösnummer: 0:40. Eksterlanda abono kr. 4:50 aŭ 15 int. respondkuponoj.

Annonspris: 0:20 pr mm. Korrespondensannons: 1:50 (aŭ 5 int. respondkuponoj).

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a. Postadress: Fack 19071, Stockholm 19. Expedition: Sveavägen 98, VI. (Kl. 19—21.) Telefon: 31 65 01 (förlagschef 50 88 05). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar m. m.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Medlemsavgifter. Direkt ansluten medlem erlärer kr. 7:50 pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidningen, erlärer kr. 4:— pr år.

Föreningar. Enl. beslut å SEF:s årsmöte 1947 skall kollektiv prenumeration ske från alla föreningar anslutna till SEF. För varje medlem erlärer en avgift av kr. 5:— (familjemedlem kr. 2:—). Medlemsförteckning (vari familjemedlem betecknas med F) insändes av föreningens kassör senast i januari.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. Ĉefdelegito redaktoro Einar Adamsson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Tel. 14 58 40, poŝtgira konto 443 81. Kotizoj: MJ 4:— kr., MA 10:— kr., MS 20:— kr., kaj Patrono 100 kr.

## Stockholms esperantister

Anmäl er till Frank Johansson, tel. 42 35 77 eller 49 35 77, för deltagande i motionsgymnastiken, som börjar i Nicolai skola i sept. Kostnaden för hela säsongen (sept.—april) är endast 4 kr. Dusch- och badmöjligheter.

Gymnastiken ledes helt på esperanto.

## YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
**Hällabrottet**

## CYKELVIMPEL

Vit med grön bård, stjärna och text Esperanto.

I sista stund ha vi lyckats få fram en ny, vacker vimpel och kunna vi nu expediera den omgående från lager.

Pris kr. 1: 30 + porto 10 öre

Insänd likvid i frimärken eller till postgirokonton 578 (så sker expeditionen fortare).

## Ordförande-klubba

i form av en esperantostjärna i grönlackerad björk med skaft av naturfärgad ek.

En prydnad för varje esperantoklubb och lämplig hedersgåva till avgående ordförande.

Kr. 7: 50

### Aktuell!

## LA JUDA ŜTATO

Provo de moderna solvo de la juda problemo  
Av D-ro Th. Herzl

Hft. 2: 50 Inb. 3: 75

### KOMPLETA ESPERANTA

## RIMVORTARO

Nun baldaŭ naskiĝos poetoj  
en hejmoj kaj en societoj  
ĉar per nia rima vortaro  
vi verku nur laŭ formularo

Kr. 1: 50

### LA EKSPEDEJO ESTOS PRESKAŬ

## FERMITA

inter 17.7—21.8 pro ferio kaj kongreso.

(Ni provos aranĝi ekspedojn almenaŭ 1-foje semajne — se helpanto estos trovebla).

## Från Amerika o. Österrike

har följande böcker just kommit hem

"Miserere" och "Thais" — berättelser av Mabel Wagnalls och Anatole France. 66 sidor. .... 1: 50

"La akrobato de nia Sinjorino" — En legend som ursprungligen skrivits på franska i slutet av 1100-talet av okänd författare. Tryck i två färger på 19 sidor inbundna med grön silkesnodd. Konsttrycksbilaga "Madonna". .... 1: 50

"La rozujo ĉiumiljara" — Av Mabel Wagnalls. Med 2 konsttrycksbilagor — fotografier av författarinnan och översättaren. 47 sidor. .... 1: 50

"Blanche, La virgulino de Lille" — Av Sarah H. Adams. Konsttrycksbilaga "Kvinnobyst". 33 sidor. .... 1: 50

"Lando de Arĝenta Akvo" — Av Vingie E. Roe. Berättelse om Amerikas urinvånare indianerna och deras väg mot civilisationen. 48 sidor. .... 1: —

Samtliga dessa böcker översatta av Edward S. Payson.

"Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes" 55 sidor. .... 2: 50  
Utg. av Österrikiska Esp. Institutet 1947.

"Freude durch Esperanto" — Lärobok i Esp. på tyska av Hugo Steiner. Utgiven 1946. 96 sidor. .... 2: 50

"Esperanto-Deutsch Handwörterbuch" — 104 sidor. .... 3: 50

"Tri majstronoveloj" — H. von Kleist: La tertremo en Ĉilio. — Th. Storm: Veronika. — A. Stifter: Fragmento el La Kondoro. 32 sidor. .... 2: 25

"La mondopaco kiel psikologia problemo" Av Hans Thirring. 36 sidor. .... 1: 25

10 % för porto tillkommer vid order under 10: —



1	FÖRLAGSFÖRENINGEN	1
9	<b>ESPERANTO</b>	9
1	FAK 19071	4
8	STOCKHOLM 19	8
	POSTGIRO 578	